# KIEL DIRI TRIMANIERE

(5-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:
Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**



Rita estis kontraktita, kiel dekoraciistino, mebli loĝejon per futurismaj utilaĵoj kaj elektraj hejmiloj.

Oni kontraktis Rita-n kiel dekoraciistinon, por ke ŝi meblu loĝdomon per pint-teknikaj objektoj kaj elektraj hejm-aparatoj.

Ĉar ŝi estas dekoraciistino, Rita faris kontrakton, por provizi loĝejon per meblaro kaj elektraj hejmo-aparatoj je alta industrieco.



Anstataŭ tradicia gasa fornelo, Rita, kiel fakulino, elektis plej modernan induktan fornelon.

Anstataŭ eksmoda fornelo, Rita, kiel specialiĝintino, elektigis lastmodan fornelon je indukto.

Anstataŭ malnova fornelo je butano, Rita, ĉar ŝi estas specialistino, preferis pint-teknikologian fornelon per indukto.



# Indukta fornelo kun nur unu brulilo




Mikroonda fornelo



Karba fornelo



Gasa fornelo
je kvar flamingoj



TRIEKRANA CIFERECA KOMPUTILO

Roberteto, la knabo de la familio, petis, ke Rita serĉu triekranan ciferecan komputilon, pli adekvatan al potencaj elektronikaj videoludoj.

Robĉjo, la infano de la familio, postulis de Rita, indiki ciferecan komputmaŝinon kun tri ekranoj, pli taŭgan por komputilaj ludoj.

Roĉjo, la familiido, ordonis al Rita, ke ŝi trovu triekranan komputoron pli idealan por pezaj elektronikaj videoludiloj.



# HEJMA KINOTEATRO

D-ro Ivo, la ĉefkontraktinto, postulis al Rita, la kontraktitino, munti luksan hejman kinoteatron je ĝis dek mil spesoj.

D-ro Ivo, la familiestro, petis al Rita, la dekoraciistino, ke ŝi aranĝu ornamriĉan hejman kinejon valorantan maksimume dek mil spesojn.

D-ro Ivo, la monhavanto, mendis al Rita, la dekoraciistino-aĉetistino, ke ŝi starigu pompan hejmkinejon per ĝis dek mil spesoj.



# BIOLAMPO

Rita devis taksi la prezojn de cent biolampoj, por instali ilin ekster la loĝejo.

La profesiulino antaŭkalkulis la prezojn de cent ekolampoj instalotaj en la eksteraĵo de la domo.

La dekoraciistino pridemandis la prezojn de cent biolampoj lumontaj ekstere de la loĝdomo.



Inkandeska
lampo aŭ ampolo



Fluoreska lampo
aŭ lumtubo

BIOLAMPO



EKOLAMPO



# FUTURISMA TABLO

Enirinte en fakan butikon, Rita logiĝis de la fasono de futurisma tablo.

Ŝi tuj aĉetis ĝin.

Alirinte al specialiĝinta meblovendejo, Rita estis logata de la estetika formo de avangarda tablo.

Ŝi aĉetis ĝin tuje.

Enirinte al faka meblejo, Rita miris la aspekton de alloga post-moderna tablo.

Ŝi rapide pagis por ĝi.



MANĜOTABLO
EL PALISANDRO



TRADICIA
SKRIBOTABLO




VERANDA TABLO





En foirejo de hejmaj utilaĵoj, Rita estis multe impresita de tre belstilaj lustroj, tiamaniere ke ŝi enpakigis du el ili, ne volante scii pri ilia kosto.

Vizitante foiron de hejmaj utilaĵoj, Rita surpriziĝis de tre stiligitaj pendlumiloj, tiel ke ŝi mendis paron da ili, ne demandante pri la prezo.

Dum vizito al foiro pri utilaj hejmaĵoj, Rita forte impresiĝis de altstilaj lustroj, tiel ke ŝi aĉetis paron de ili, demandante nenion rilate ilian prezon.



**LUMVENTOLILO KUN TELEREGILO**



**LUMŜIRMILO EL VITRO**



**KLASIKA LUSTRO**



Ŝi sugestis al la geloĝantoj aĉeti tuŝekranan fridujon kun 3D-vidigo kaj komputileto.



Ŝi konsilis al siaj gekontraktintoj mone havigi al si fridujon kun tuŝekrana pordo, 3D-videbleco kaj komputsistemo.

Ŝi rekomendis al la gemastroj de la domo monakiri tuŝekranan glaci-ŝrankon kun 3D-vidado kaj komput-meĥanismo.



**Ordinara (simpla) fridujo**



**Tuŝekana fridujo**



**Kongel-kesto**



Dum ŝi ankoraŭ traserĉis modernstilajn hejmaĵojn, Rita vidis en ĉiorevuo kuriozegan altstilan bankuvon. Plej urĝe ŝi telefonis al la vendisto, por informiĝi pri la livero-sistemo.

Ankoraŭ serĉe de hejmaj modernaĵoj, Rita vidis en magazino tre kuriozan novstilan bankuvon. Sammomente ŝi telefonis al la magazeno, por ekscii pri ĝia transportado.


Ankoraŭ serĉante modernegajn hejmaĵojn, Rita vidis en revuo unike interesan fajne dezajnitan vitrokuvon por bano. Tuje ŝi telefonis al la ĉiovendejo, demandante pri la transport-maniero.



KLASIKA  BANKUVO



JAPANA BANKUVO





# LUMA DUŜILO

Per sia cifereca fotografilo, Rita faris foton de luma duŝilo elmontrata en la vendeja vitrino, kaj ret-sendis ĝin al sia klientino. Mirinte ĝin, tiu ĉi tuj telefonis ŝin kaj kriante parolis: *“Mi ŝategis ĝin! Aprobite!”*

Per sia cifereca kamerao, Rita fotis eksponatan luman duŝilon en la magazeno, kaj per la interreto ŝi sendis la foton al la kontraktintino. Vidinte ĝin, ŝi telefone kriis al Rita jene: *Aĉetu ĝin tuje!*

Per sia cifereca fotilo, Rita fotografis ekspoziciatan luman duŝilon en la butiko, kaj sendis interrete la fotografaĵon al la dommastrino. Post kiam tiu ĉi vidis ĝin, ŝi kriis telefone al ŝi tiele: *Tuj aĉetu ĝin!*



**Akvo-tubo**



**Akvo-hoso**





La plej altkosta akiraĵo estis tiu domserva roboto sur la bildo. Ĝi ne estas tre kompetenta, sed eksigis la iaman dom-dungitinon.

Sed la ĝardenisto plu laboras, almenaŭ dum kelka tempo.

# DOM-ROBOTO

La plej multekosta aĉetaĵo estis tiu dom-roboto en la bildo. Ĝi ne estas tre efika, sed maldungigis la maljunan dom-servistinon. Tamen la ĝardenisto daŭre laboras, almenaŭ dume.

La plej altpreza aĉetita hejmaĵo estis tiu doma roboto el la bildo. Ĝi ne estas tre laborema, sed forigis la iaman dom-servistinon. La ĝardenisto, tamen, restis laboranta, eĉ se nur kelkatempe.



**DOMSERVISTINO**





**ĜARDENISTO**

# DOM-ROBOTO

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

